

# *Ora Ĵurnalo*

*ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE*

Numero 73, Majo 2024



Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	Solberga, loko en Bohuslando – Solberga, en ort i Bohuslän.....	17
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Stenskvättan, ett vårens glädjebudskap – Saksikolo, ĝoja mesaĝo de printempo, <i>Renate Säfström</i> .....	20
Espeporko meditas.....	3	La arbara gardisto, tetra koko, montras sian grandiozecon – Skogvaktaren, en tjädertupp, visar upp sin prakt, <i>Jan Hellström</i> .....	21
Printempaj hajkoj.....	3	Ĉevaloj, ĉevaloj!, <i>Walter Klag</i> .....	21
La "Vesperstelo" – Aftonstjärnan .....	4	La ĉevalo de la kamparano .....	22
Esperantistoj havas multajn interesojn! .....	7	La sola horo, de J. L. Runeberg .....	23
Vizito al muzea muelejo en la gotenburga regiono – Hillefors grynkvärn, belägen i Säveåns naturreservat .....	7	Naciismo kaj paranojo ĉesigis Esperanton, <i>Dan Jönsson</i> .....	24
Mia 1-tuba radio.....	9	Naskiĝtago, <i>RÓZSAS János</i> .....	26
De Skövde al Gotenburgo .....	10	Akvo en niaj pejzaĝoj – Vatten i våra landskap .....	28
Kiel ili pensis tiam? – Hur tänkte dom då?...11		Annonskärlek är anledningen till sverigeflytten .....	29
La epizodo el la vivo de la Tero, <i>Tatjana Auderskaja</i> .....	12		
Aventuroj de iu migrinto, <i>Tatiana Auderskaja</i> .....	14		
6-lingva biologia vortaro .....	15		
Kiel kreĝis la universo? .....	15		

Kiel ili pensis tiam? – Legu la senintence amuzajn anoncojn en la paroĥaj gazetoj, p. 11.

Hur tänkte dom då? – Läs de oavsiktligt roliga annonserna i församlingsbladen, s. 11.



## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com). Fina paĝarangô: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.



## Espeporco meditas



- ❁ La Majfloro estas artefarita floro, kiun oni metas sur sian jakon aŭ mantelon. Lernejoj vendas ĝin, antaŭ la unua de majo kaj la mono iras al filantropiaj celoj.
- ❁ Tatjana Auderskaja estas persono, kiu havas "multajn kordojn sur sia liro" – sveda esprimo signifikante: havi multajn talentojn. Legu ŝian rakonton, limerikojn kaj ekzemplon el ŝia biologia vortaro. Malavare ŝi lasas al vi legi la nomojn pri fiŝoj, amfibioj, reptilioj, birdoj, mamuloj, moluskoj kaj spongoj en ses lingvoj. Esperanto estas unu el la lingvoj en ĉi tiu granda vortaro.
- ❁ Eraraj aludoj povas ekigi ridegojn! Legu la Paroĥan paĝon, kiun trovis Lasse Granat!
- ❁ Kaj nun estas kaj iam estis malbonaj tempoj, kaj la verkistoj spegulis tion – Tatjana Auderskaja en *La epizodo el la vivo de la tero* kaj Selma Lagerlöf en *La mono de sinjoro Arne*.
- ❁ Por gajiĝi oni povas aŭskulti *Aventuroj de iu migranto* – limerikoj pri Bremeno.
- ❁ Kiel kreiĝis la tero? Respondojn vi havos de reprezentantoj de naŭ religioj aŭ de kelkaj ismoj.

- ❁ *Ĉu naciismo kaj paranojo haltigis Esperanton?* Dan Jönsson meditis pri ĉi tiu temo en Radio P1.
- ❁ Viaj radioaparatoj certe estas tre komplike faritaj. Male estis kiam Lasse Granat faris sian radion.
- ❁ Ĉevalo kun la nomo Esperanto instigis Walter Klag sendi informon pri la rajdcentro Gestüt Birkhof. Mi rememoris francan gazeton, kie infanoj el pluraj landoj skribis artikoletojn. Ĉi tiun fojon mi kaptis teatraĵon pri ĉevalo el Burkina Faso en 1993.
- ❁ La klimato ĉiam estas aktuala temo, aparte nun, kiam baldaŭ estos ĝenerala elekto al la EU-parlamento (9 junio). Vi estas invitita al Tjörn 18 majo!
- ❁ La venonta Ora Ĵurnalo estos duobla numero junio-julio, ĉar ni, la redaktantoj, meritas iom da libertempo. Do, vi havos la eblecon sendi artikolojn kiel someran legadon! La adreso estas la kutima – [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com). En la ĉeno troviĝas mi, Ingegerd Granat, Andreas Nordström, Inga Johansson kaj Birgitta Anevik.
- ❁ Kaj ni ĉiuj diras: Bonvenon kun artikoloj kaj ideoj! Ĝis numero 74! /Siv

## Printempaj hajkoj

La cervido  
forskuas la papilion  
kaj endormiĝas denove

Issa



Falinta floro  
revenis al la branĉo –  
estis papilio

Moritake

# La "Vesperstelo" – Aftonstjärnan

de Ingegerd Granat



Se vi malfermetas la pordon al Aftonstjärnan ĉe Plåtslagargatan 2 en Lindholmen, vi eble povos senti la ĉeeston de la aŭtentika gotenburga civitano kaj aktoro, aŭtoro kaj manuskriptisto Kent Andersson.

Li estis naskita la 2-an de decembro 1933 kaj, laŭ sceno ludita en Aftonstjärnan, estis "malbela kaj krieganta bebo", kiu estis lasita en infanĉaro. Verŝajne Kent Andersson mem verkis la manuskripton, kie du gotenburgoj en epokaj vestaĵoj haltas kaj komentas la ĉaron kaj ĝian enhavon ĝis la patrino eniras la scenon. (Havebla el YouTube.)

Kiel aktoro, li aperas en multaj filmoj ekzemple "Jönssonligan reaperas", "La Hedebyanoj", "Vibrisoj kaj pizoj", "Svedio al la svedoj" kaj en multaj pliaj filmoj. "Hejmo", "La floso" kaj "La sablokesto" estas teatraĵoj, kiuj estis prezentitaj en pluraj lokoj kun

Kent Andersson kiel manuskriptaŭtoro kaj kreinto de tute nova speco de teatraĵo laŭ stilo kaj karaktero.



Göteborg tappade verkligen en förgrundsfigur för kulturen när Kent Andersson gick ur tiden den 3:e november 2005.

Han hade lagt tio år på Dramaten i Stockholm

bakom sig när

Om man gläntar på dörren till Aftonstjärnan på Plåtslagargatan 2 på Lindholmen, kanske man kan ana närvaron av den genuine göteborgaren och skådespelaren, författaren och manuskribenten Kent Andersson.

Han föddes den 2:e december 1933 och var enligt en scen spelad på Aftonstjärnan "en, ful och skrikande baby" som blivit lämnad i en barnvagn. Förmodligen har Kent Andersson själv skrivit manuset där två göteborgare i tidstypiska kläder stannar och kommenterar barnvagnen och dess innehåll tills mamman kommer in på scenen. (Finns på YouTube.)

Som skådespelare dyker han upp i många filmer som "Jönssonligan dyker upp igen", "Hedebyborna", "Morrhår och ärtor", "Sverige åt Svenskarna" och i många fler filmer. "Hemmet", "Flotten" och "Sandlådan" är teaterstycken som spelats på flera ställen med Kent Andersson som manusförfattare och danare av en helt ny typ av teaterstycken beträffande stil och karaktär.

han 1996 kom tillbaka till Aftonstjärnan på Hisingen. Kent Andersson iscensatte fem

Gotenburgo vere perdis elstaran kulturan figuron kiam Kent Andersson forpasis la 3-an de novembro 2005.

Li jam metis dek jarojn ĉe Dramaten en Stokholmo malantaŭ si, kiam li revenis al Aftonstjärnan en Hisingen en 1996. Kent Andersson surscenigis kvin revuojn, kiuj estis prezentitaj ĉe 530 prezentadoj.

Oni povus diri, ke "Aftonstjärnan" estas bonega memoraĵo de la "bona kaj varma" personeco de Kent Andersson kaj kreiva forto kie li ĉiam metis justecon unue.

La drinkejisto ĉe la najbara drinkejo en Majorna atestas, ke Kent Andersson estis en bona humoro kaj sentis sin bone la tutan vesperon, kiam li forlasis la drinkejon.

Li estus 72-jara, se li ne estus falinta ekster sia loĝejo en Majorna.

Sed la "Aftonstjärnan", la malnova karamelfabriko, "la Popola Domo" kaj la Kinejo daŭre ĵetas siajn kulturajn radiojn super Gotenburgo en la spirito de Kent Andersson. Nur iru tien.



### La kultura markado de Aftonstjärnan

Post malfacilaj renoviglaboroj, kiuj komenciĝis en 1988, la kinejo povis esti remalfermita en 1994. Tiam la konstruaĵo de la gubernia estraro ankaŭ estas markita kiel kultura monumento. En la lasta tago de la jaro 1996, la scenejo estas

revyer som framfördes vid 530 föreställningar.

Man skulle kunna säga att "Aftonstjärnan" är ett stort minnesmonument över Kent Anderssons "goa och varma" personlighet och en skaparkraft där han alltid satte rättvisan i första rummet.

Bartendern på kvarterskrogen i Majorna vittnar om att Kent Andersson hade haft ett gott humör och mått bra hela kvällen när han lämnade puben.

Han skulle ha blivit 72 år om han inte stupat utanför sin lägenhet i Majorna.

Men "Aftonstjärnan", den gamla karamelfabriken, Folkets Hus och Biografen fortsätter att kasta sina kulturella strålar över Göteborg i Kent Anderssons anda. Det är bara att gå dit.



### Kulturmärkningen av Aftonstjärnan

Efter ett hårt upprustningsarbete som startade 1988 kunde man 1994 återinviga biografen. Då kulturminnesmärks också byggnaden av länsstyrelsen. Nyårsafton 1996 återinvigs scenen med föreställningen "Under Aftonstjärnan". Det var Kent Andersson som skrivit om sin barn- och ungdomstid på Lindholmen.

Lite tillbakablickar:

remalfermita kun la prezento "Sub la vespera stelo". Estis Kent Andersson kiu skribis pri sia junaĝo kaj juneco ĉe Lindholmen.

Kelkaj rerigardoj:

En 1903 la domo estis kompletigita. Ĝi estis anstataŭaĵo por la asociokonstruaĵo, kiu forbrulis en 1902. En 1910 elektro estis instalita kaj la filmmontradoj komenciĝis.

Hodiaŭ estas multe da interesa, eduka kaj distra enhavo en la programo. En la momento de la skribado, la Scienca Festivalo havas programon pri "Ondoj", filmo pri tio, ke ĉiam estas morgaŭo, kaj tion ni devas kredi kaj esperi.

Ĉiam indas ĝisdatigi sin pri tio, kio okazas ĉe Aftonstjärnan!

Malgranda ekzemplo de la programo:

### "La majstro de memoro Jonas von Essen"



La viro, kiu sukcesis akiri esceptan memoron de apenaŭ memori ion ajn ĝis parkerigi 50 000 dekumajn lokojn de Pi (3.14) tio postulis al li duonjaron.

Li prelegos pri tio ĉe Aftonstjärnan la 18-an de majo, je la 18-a. Mia konsilo estas: rapidu kaj rezervu bileton!

Tiuj el ni, kiuj kutimas spekti televidon, ankaŭ vidis lin agi plurfoje. Li gajnis unu milionon da kronoj sen uzi ajnan "savŝnuron" en la programo "Poŝtkoda milionulo", prezentita en la distra programo "Talang" kaj ĉasis murdistojn en detektiva sapoteatraĵo kune kun aliaj famuloj en kastelo ie. Tie, unu el liaj kunludantoj estis la fosanta ĵurnalisto Janne Josephsson el Gotenburgo.

Jonas von Essen estas absolute fantazie amuza kaj miriga personeco. **Atentu lin!**

År 1903 stod huset färdigbyggt. Det var en ersättning för det föreningshus som brann ner 1902.

År 1910 drog man in elektricitet och filmvisningarna kom igång.

Idag står det mycket intressant, folkbildande och underhållande på programmet. I skrivande stund har har Vetenskapsfestivalen ett program om "Vågor", en film om att det alltid kommer en morgondag, och det får vi tro och hoppas.

Det är alltid värt att uppdatera sig på vad som händer på Aftonstjärnan!

Ett litet exempel på programmet:

### "Minnesmästaren Jonas von Essen"

Mannen som lyckades skaffa sig ett exceptionellt minne från att knappt kommit ihåg något alls till att memorera 50.000 decimaler på Pi (3,14) detta tog honom ett halvår.

Detta skall han föreläsa om på Aftonstjärnan den 18:e maj, klockan 18.00, mitt råd är: att skynda sig att boka en biljett!

Vi som har ovanan att titta på TV har dessutom sett honom agera vid flera tillfällen. Han har vunnit en miljon kronor utan att använda någon "livlina" i programmet "Postkodmiljonären", uppträtt i underhållningsprogrammet "Talang" samt jagat mördare i en deckarsåpa tillsammans med andra kändisar på ett slott någonstans. Där var en av hans medlekare den grävande journalisten Janne Josephsson från Göteborg.

Jonas von Essen är en helt fantastiskt rolig och häpnadsväckande personlighet.

Håll ögonen på honom!

# Esperantistoj havas multajn interesojn!



Kiam mi rigardis en fejsbuko mi trovis tiun bildon. Mi rekonis kaj Siv, Ingrid kaj Magnus kantante en ĥoro.

Estas la preĝejo en Gråbo (= Stora Lundby) kiu faris festenon por tiuj, kiuj havis jubilean

naskiĝtagon dum la aktuala duonjaro! Ili kafumis, manĝis torton kaj ricevis po unu rozon.

/Ingegerd

## Vizito al muzea muelejo en la gotenburga regiono Hillefors grynkvärn, belägen i Sävåns naturreservat

de Siv



La grenmuelejo en Hillefors, situanta en la naturrezervejo de Sävåns i Stenkullen, Lerum, eble estas la sola avena muelejo en la mondo, kiu estas funkciigata per rekta akvoenergio. La muelejo nun estas posedata de la komunumo de Lerum kaj luita de la muzeosocieto Hillefors Grynkvärns Museiförening.



i Stenkullen, Lerum, är kanske den enda av världens havregrynskvärnar som drivs med direktverkande vattenkraft. Kvarnen ägs numera av Lerums kommun och arrenderas av Hillefors Grynkvärns Museiförening.

För 100 år sedan var det inte ovanligt att en fabrik drevs av direktverkande vattenkraft. Det vill säga en turbin som roterade av det

Antaŭ 100 jaroj estis ne malofte ke fabriko estis funkciigata per rekta aganta akvoenergio. Tio signifas turbinon, kiun rotaciigas la preterpasanta akvo per ilaroj, ŝaftoj kaj zonoj, kiuj transdonas la potencon al la diversaj maŝinoj de la fabriko. Sed hodiaŭ neniu potencotransigo okazas tiamaniere. Estas multe tro nepraktike por fabriko troviĝi proksime al fluanta akvofonto kaj la riskoj de akcidentoj estas tre altaj.

La muelejon daŭre eblas viziti per la muzeosocieto Hillefors Grynkvorn, kiu laboras por reestigi ĝin, por montri kiel industrio en la 19-a kaj 20-a jarcentoj povis funkcii. La muelejon posedis la sama familio jam dum 90 jaroj. La loko de Hillefors ja situas ĉe la rivero kaj oni povis reguli kiom da akvo oni bezonis por funkciigi la muelilon.

Laŭlonge de la rivero estas vojeto, kie multaj iras por ĝui la ĉirkaŭaĵon – foje kun tre trankvila rivero, foje kun furioza rivero. Kun multe da ŝaŭmo.

En la muzea muelejo okazas multaj eventoj, ekz. verkistino venigas homojn al verkado de infanlibroj kun inspiro de la muelejo.

### **Inspira estas ankaŭ la libro *Leteroj el mia muelejo.***

*El interreto: Alphonse DAUDET (1840–1897)* estis franca verkisto. Li verkis interalie la romanojn *Lettres de Mon Moulin* (Leteroj el mia Muelejo) kaj *Tartarin de Tarascon*, ambaŭ tradukitaj al Esperanto. Leteroj el mia muelejo estis publikigita esperante en 1949 de Nihon Esuperanto Gakkai, 78 paĝoj.

Temas pri novelaro el 1869. La noveloj enkadriĝas plejparte en Provenco kaj havas facilaniman tonon fiksiĝintan en lokaj legendoj kaj popolfabeloj. Daudet mem translokiĝis de Parizo al Provenco kaj la noveloj estas skribitaj el la perspektivo de iama parizano.


Kelkaj el la noveloj antaŭe estis publikigitaj en gazetoj, kiel ekzemple *Le Figaro* kaj *L'Événement*, la plej fruaj en 1865. **La libro estis publikigita en la sveda en 1930 en**

förbiströmmande vattnet via kugghjul, axlar och remmar som förmedlade kraften vidare till fabriken olika maskiner. Men idag sker ingen kraftöverföring på detta sätt. Det är alldeles för opraktiskt att en fabrik måste ligga i närheten av en strömmande vattenkälla och olycksfallsriskerna är mycket stora.

Kvarnen finns ännu kvar att besöka genom Hillefors Grynkvorn Museiförening som arbetar med att restaurera den, för att visa hur en industri på 1800- och 1900-talen kunde fungera.



### **Inspirerande är också boken *Brev från min kvarn.***



Det är en novellsamling från 1869 av den franske författaren **Alphonse Daudet**. Novellerna utspelar sig till största delen i Provence och har en lättsam ton med rötter i lokala skrönor och folksägner.

Daudet hade själv flyttat från Paris till Provence och novellerna är skrivna ur en före detta parisares perspektiv.

Några av novellerna hade tidigare publicerats i tidningar som *Le Figaro* och *L'Événement*, de tidigaste 1865. **Boken gavs ut på svenska 1930 i översättning av Thord Lundgren och på esperanto 1949.**

En ljudbok inläst av Hans Alfredson gavs ut 2008.




traduko de Thord Lundgren kaj en esperanto en 1949.

Tri el la noveloj estis la bazo por la filmo *Letters from my mill* de Marcel Pagnol de 1954. En 1968 Pagnol faris televidfilmon de kvara novelo de la kolekto.

Tre av novellerna låg till grund för Marcel Pagnols film *Brev från min kvarn* från 1954. År 1968 gjorde Pagnol en TV-film av en fjärde novell från samlingen.

## Mia 1-tuba radio

de Lasse Granat



Mia intereso pri elektrotekniko komencis vekigi en mia frua adolesko (en la 1950-aj jaroj). Mia ĉefa scifonto estis libroserio de la 1920-aj jaroj, "Inventaĵoj" ĝi nomiĝis. Tie oni priskribis kiel oni povas konstrui "modernan" radion (mi transsaltis la kristalajn ricevilojn, kiuj estis oftaj en la 20-aj kaj 30-aj jaroj).

Eble mi ne plene komprenis kiel funkcias la radiondoj, sed laŭ la priskriboj en la "Inventaĵoj" estis klare, ke oni bezonas longan ŝtaldraton ekstere kiel antenon, simplan kupran draton en la domo, grandan bobenon kun multaj tavoloj per turnoj de ekstreme fajna kupra drato, ene de ĝi malgranda turnanta bobeno kun identaj dratoj, rotacia kondensilo konsistanta el du metalaj platoj proksimaj, kiuj oni movas por ŝanĝi la kapacitancon (kaj tiel elekti la radiokanalon), radiotubo, kiu aspektis kiel

ampolo (simila konstruo kun vakvaj vitrotuboj kaj eksteraj kontaktoj) kaj kiu havis filamenton, gvidreto kaj anoddrato (elektraj konduktiloj ene de la tubo), turnebla rezistilo kaj plumbo eksteren al paro de aŭdiloj. Per paro da malgrandaj rezistiloj, konvene altaj tensioj estis provizitaj per malgranda baterio al la anodo de la tubo kaj al ĝia filamento. Tio estas ĉio.

Io kiel la ilustraĵo supre.

La muntado temis nur pri lutado de ĉio per malgrandaj kupraj dratoj.

Malgranda ligna skatolo (kiel ŝu-skatolo) entenis ĉion, ekstere estis tri malgrandaj teniloj, unu por elekti la frekvencon turnante la kondensilon, unu por kontroli la sonnivelon en la aŭdiloj uzante la turneblan rezistilon kaj unu por kontroli la turnantan bobenon, kiu

faris ke vi ricevu la maksimumon de la radiondoj, kiujn vi ricevis de la anteno.

Tio estis antaŭ ol ekzistis frekvenca modulado, kiun ĉiuj hodiaŭ rekonas kiel "FM". Per miaj aparatoj, mi nur povis ricevi amplitudmodulitajn (AM) radiosignalojn. Tiam mi povis aŭskulti per longaj ondoj, mezaj ondoj kaj mallongaj ondoj. La svedaj radiokanalaj (P1 kaj P2) elsendis per ondoj longaj, sed multaj el miaj plej ŝatataj kanaloj, ekz. "Radio Luksemburgo", elsendis per ondoj mezlongaj aŭ kurtaj, per kiuj estis ankaŭ aŭdeblaj radiokanalaj el la tuta Eŭropo.

Por ricevi kiel eble plej bonan sonforton en la aŭdiloj (per la ricevkapablo, kiun vi havis per la anteno), oni povis agordi la turneblan bobenon tiom, kiom oni kuraĝis. Ĝi rekuplis la jam amplifitan signalon en la radiotubo reen

kun la bobeno tiel ke ĝi kunlaboris kun la envenanta signalo kaj estis plifortigita denove, por tiel diri.

Se vi tro multe rekupladis, ĝi tiom plifortiĝis, ke ĝi nur fariĝis tre forta hurlado en la aŭdiloj. Tiam vi malpliigis la regulilojn, kompreneble.

Nu, la rekupladita hurlado ne nur eliris en miajn aŭdilojn. La tuta radioaparato fariĝis dissendilo, kiu dissendis ĉi tiun hurlon al ĉiuj radioj en la ĉirkaŭaĵo, ĝi vere estis malnovmoda "larĝa bando"! Nia plej proksima najbaro, verkisto, ne vere plendis, li komprenis, ke estis mia kulpo, sed ridis kaj proponis, ke mi silentigu la "perturban transdonon". Ĉiuj aliaj najbaroj ne povis kredi, ke estas la malgranda afabla knabo apuda, kiu hurligis iliajn radiojn!

## De Skövde al Gotenburgo

de Siv



Ĉe Birgitta en Lidköping. Birgitta kaj Janne rigardas aĵojn de la eksa esperantoklubo de Skövde. Ankoraŭ kelkaj aĵoj ricevos novan hejmon en Stannum, kie la biblioteko de la gotenburga esperanto-societo troviĝas. Inter la aĵoj troviĝas almenaŭ du trezoraj:

### 1. Martelo de prezidento

Sur la martelo estas la kapo de Zamenhof.




La teksto: La martelo apartenis al la ESPERANTO-KLUBO DE SKÖVDE 10 okt. 1932 – 10 majo 2023. Laŭ ies informo, la


martelo estis farita de Schuldenfrei, Gotenburgo.

Texten: Klubban har tillhört SKÖVDE ESPERANTOKLUBB 10 okt. 1932 – 10 maj 2023. Enl. viss uppgift ska klubban vara gjord av Schuldenfrei, Göteborg.

## 2. Gastlibro de januaro 1986 ĝis decembro 1991



Belaj bildoj sur ĉiu paĝo kaj la manskriboj de la ĉeestintoj belas!



## Kiel ili pensis tiam? – Hur tänkte dom då?

Paroĥaj folioj foje estas pli amuzaj ol oni pensas. Jen kelkaj vortumoj de diversaj specoj de preĝejoj, trovitaj en interreto:

Församlingsblad är ibland roligare än man tänkt. Här är några formuleringar från olika sorters kyrkor, funna på nätet:

– La temo por la ĉi-vespera diservo estos "Kio estas la infero?" Venu frue kaj aŭskultu kiam la koruso ekzercas!

– Ne permesu ke maltrankvilo mortigas vin. Via kongregacio volonte helpas.

– Por tiuj el vi, kiuj havas infanojn kaj ne scias pri tio, ni havas infanzorgadon sur la paroĥa etaĝo.

– La sinjorinoj en la preĝejo formetis malnovajn vestaĵojn ĉiaspecajn kaj rigardeblas en la preĝeja kelo vendrede vespere.

– Ok novaj korusaj kapotoj estas bezonataj ĉar kelkaj novaj membroj aliĝis kaj kelkaj malnovaj eluziĝis.

– Grupo el la "pezgardistoj" (societo por tiuj, kiuj volas malgrasiĝi) kunvenas en la preĝejo ĉi-vespere je la sepa horo. Ni petas ilin uzi la grandajn duoblajn pordojn en la flanka enirejo.

– Ĉi-vespere okazos kunvenoj ĉe la norda kaj suda finoj de la preĝejo. Infanoj estos baptitaj ĉe ambaŭ finoj.

**Hop, kiel povas fariĝi!**

– Temat for kvällens gudstjänst kommer att bli "Vad är helvetet?" Kom tidigt och lyssna när kören övar!

– Låt inte bekymren ta ihjäl dig. Din församling hjälper gärna till.

– För er som har barn och inte vet om det har vi barnpassning i församlingsvåningen.

– Damerna i kyrkan har lagt av gamla kläder av alla sorter och kan beskådas i kyrkans källare på fredag kväll.

– Åtta nya körkåpor behövs eftersom några nya medlemmar har kommit till och några gamla har slitits ut.

– En grupp av viktväktarna träffas i kyrkan i kväll klockan sju. Vi ber dem använda de stora dubbeldörrarna i sidoentrén.

– I kväll kommer det att bli samlingar i både norra och södra änden av kyrkan. Barn kommer att döpas i båda ändarna.

**Hoppсан, så det kan bli!**



## La epizodo el la vivo de la Tero

de Tatjana Auderskaja, Odeso

«Kiam mi ekvidis la ĉielan lumon, mi eĉ ne ekmiris tro. Nu, ĉu gravas? – rezonis mi. Ĉu tio min iamaniere tuŝas? Estu saĝuloj kaj potenculoj, kiuj prizorgu la bonstaton de la urbo; kaj mi havas sufiĉajn zorgojn pro mia propra devo.

Mia devo estas kontroli aŭskultilojn. Apud ĉiu domo staras ili kaj aŭskultas pensojn de ĉiuj loĝantoj. Pri nekonvenaj pensoj ili raportas al Ofica Komisiono, kaj tie oni bone scias «forigi netaŭgulojn».

Kaj jen, tiuj porkoj nokte malfunkciigas aŭtomatojn, kaj neniuj scias, kiel ili tion faras.

Oni diras, ke ili uzas pensajn kanalojn por difektigi la aŭskultilojn; sed ĉu la aŭtomatoj estas tiel stultaj por ne defendi sin? Mi opinias, ili frenezigas la aŭtomatojn, ja mi trovas ilin matene kun kaĉo en la cerbo, ili forgesas ĉion aŭditan, ne plu obeas ordonojn, kaj ilia uzado jam ne estas ebla.

Hodiaŭ aperis tiom multe da difektitaj aparatoj, ke mi eĉ liberan sekundon ne havis. Preskaŭ ĉiuj en mia distrikto ne funkcias.

Kiam mi la duan fojon ekvidis la lumon, ĝi jam estis sur horizonto; pli pala, sed pli vasta, ĝi brakumis tutan ĉirkaŭvidon. La lumo estis

blua, kun blanka aŭreolo, sufiĉe hela por vespero.

Mi ekpensis pri aliaj homoj. Eble, ili ion scias?

Tamen, en la «Komuna penso» neniuj informoj aperis, kaj la homoj mem ne povas ion ekscii, ili ja loĝas en la Domoj. Nur ni, kontrolistoj, rajtas paŝi surtere. Oni donas al ni specialan vestaĵon, okulvitrojn... Tiel ni povas elteni la Terajn kondiĉojn, tute ne taŭgajn normale por la homa vivo. Vi imagu, iu naskis la ideon, ke la Tero, Tero mem estis iam loĝloko de homaro! Kun siaj ventoj, pluvoj, venenaj estaĵoj kaj plantoj! Oni ne povas ja kelkajn paŝojn fari sur la Tero, sen ke oni ne vundu iu danĝera. Kaj mikroboj, virusoj? Evidente, la tuta vivo de praa homo estis tiam batalo por la vivo; ĉiun tagon, ĉiun monaton li gajnis en senfina ludado kun morto. Kun natura morto, ni diru. La homo vivis kiel besto, kaj kiel besto li mortis.

Ĉu eblas eĉ komparo kun nia vivo, la vivo digna, la sola inda La Homon? Fin-fine li akiris sian merititan pozicion en la mondo kaj forigis de si ĉiujn fi-biologiajn trajtojn, plej grave la venon de l' morto. Ĉe ni oni mortas nur laŭ la ordono de l' Moŝto!

Estas la bazo de civilizita vivo: laŭ reguloj vivi, laŭ reguloj morti.

Eĉ neimageble: homo komencas ian laboron, kaj en mezo – mortas. Neniu sekvas plu. Homoj vivis kiel senfortaj, sencelaj eroj de iu Brown'a movado; ĉiu tago puŝis ilin tien, reen... Kun neordigitaj pensoj, neatendita morto – homo ne estis ja Homo! Nur ni, kun nia Moŝto...»

Subite la aero ekstremis, la blua fulmo ĉirkaŭumis la Teron, kaj pro neeltenebla brilo li fermis la okulojn. Li ne malfermis ilin plu.

Matene super la Tero leviĝis l'Suno.

Ĝi prilumis forlasitajn Domojn, kaj kelkon da homoj, vestitaj en defendkostumoj. La homoj

ĵus forlasis la Domojn, kaj timeme, senkomprene ĉirkaŭrigardadis; en iliaj rigardoj brilis miro kaj disiluzio.

Tiuj homoj dum jardekoj batalis kontraŭ la Moŝto; ili, la plej elstaraj cerboj de la Tero, unuiginte inventis la Ilon, tiun bluan energian kampon, kiu disfunkciigis la aŭtomatojn de la Moŝto, senigis ĝin de ilia apogo, de la bazo de ekzisto: nur homoj, sen aŭtomatoj, estas ja senfortaj!

Kaj jen disvaporigis la Moŝto, neniuj plu kontrolos ĉiutage niajn pensojn, ordonos al ni la farojn, pravigos la tutan nian vivon. Ni estas liberaj!

La tuta vivo haltis. La Domoj, inventaĵo de la Moŝto, ne plu funkciis, kaj homoj pereis pro manko de la vivnecesaĵoj, ili ne scipovis ja propramane liveri al si manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

Ĉion faris maŝinoj, kaj sen ili la homoj estis senpovaj kaj senfortaj. Ili ne povis eĉ spiri per Tera aero, la artefarita aero en Domoj estis por ili pli konvena...

La plimulto mortis en unuaj horoj, eĉ ne pro manko de manĝo kaj aero – pro timo. Estis detruitaj ĉiuj iliaj kutimoj, la tuta ordo de la vivo esris rompita. Neniu povas travivi la pereon de sia mondo.

Nur kelkaj saĝuloj restis. Kaj nun ili senhelpe rigardis al la tiel soifita Libera Tero. Sen homoj, sen vivestaĵoj jam, morta kaj fremda Tero kuŝis antaŭ ili.

Ili donis al la homaro Liberon, Sendependon kaj Homajn Rajtojn!

Post kelka tempo tute neniigis ruinoj de la Domoj, kaj en la kosmo restis nur – glata pura Tero, rotacianta ĉirkaŭ la Suno.

*Tatjana Auderskaja*



# Aventuroj de iu migrinto

Limerikoj de Tatjana Auderskaja



Estis iu braman' el Bremeno,  
Kiu en pantalon' sen rimeno  
Provis veni al Hal',  
Sed okazis skandal:  
Estis lia aspekto obscena.

Estis brava braman' el Bremeno,  
Kiu rajdis sur granda baleno.  
Post subita ekplong'  
Malaperis la song'  
Restis lito sur fund' de l'baseno.

La sendorma braman' el Bremeno  
Volis dormi sur mola kuseno...  
Kun terura brueg'  
Lin ĉirkaŭis la greg':  
Ŝafoj venis por nokta promeno.

Iu povra braman' el Bremeno  
Sidis longe en la kvaranteno.  
Revis li pri vakcin',  
Sed en morb-halucin'  
La vakcino okazis veneno.

La edzin' de l' bramano Bremena  
Volis pelton el felo ermena.  
Petis ŝi kun persist'  
Sed rifuzis ĉasist':  
Ĉaso estis por li granda ĝeno.

Iu sperta jogan' el Bremeno  
Longe sidis sur akra aleno.  
Estis brava hero',  
Sed penegis li tro:  
Fine trafis al joga Edeno.

Iu saĝa braman' el Bremeno  
Malsukcesis en la ekzameno.  
Sed lin savis aŭdac':  
Al la ĉefo donac' –  
Kaj li restis sur sia posteno.

Iu pia braman' el Bremeno  
Ofte manĝis radikojn de kreno.  
Estis pro ritual',  
Sed en kruda real'  
Tion faris li kun abomeno.

Obeema braman' el Bremeno  
Longe sidis en grava kunveno.  
Estis longa palavr'...  
Li ne iĝis kadavr',  
Sed lin trafis terura migreno.

La hardita bramano Bremena  
Ĉiam iris en vesto fustena.  
Dum varmego kaj frid'  
Restis li en tepid'  
Ja koton' estas ĉiam konvena.


**Aŭskultu la Youtube-version!!** [www.youtube.com/watch?v=nPWFrrOe1dY](http://www.youtube.com/watch?v=nPWFrrOe1dY)

# 6-lingva biologia vortaro: rusa–latina–esperanta–angla–germana–hispana


De **Tatjana Aŭderskaja**, biologo kaj verkisto el Odeso. Kun permeso de Tatjana mi publikigas la ligilon: <http://vortaro.zzz.com.ua>

Temas pri fiŝoj, amfibioj, reptilioj, birdoj, mamuloj, moluskoj kaj spongoj. /Siv

## Ekz. pri fiŝoj:



1. Вóбла, Плотvá, Тарáнь (рус)
2. Rutilus rutilus (lat)
3. ploto, rutelo (eo)
4. Common roach (eng)
5. Rotaugé, Plötze (de)
6. Rutilo (es)



7. Окунь (рус)
8. Perca fluviatilis (lat)
9. perko (eo)
10. European perch (eng)
11. Flussbarsch (de)
12. Perca europea (es)

## Kiel kreĝis la universo?

LERNU montras kredojn de diversaj religioj

El Lernu: <https://lernu.net>

Siv trovis la ligilon.



### Respondo laŭ kristanismo, el la vidpunkto de Gerrit BERVELING:

Mi kredas, ke Dio kreas la mondon: Li/Ŝi – ĉar Dio ne estas homo, sekve ne viro aŭ virino – estas la Kreanto. Tio ne signifas ke mi supozas scii kiamaniere Dio kreas/kreis. La scienco instruis al ni, ke okazis gigante longa evoluo-procedo antaŭ ol estis atingita la nuna stadio de la mondo (universo). Tre povas esti, ke tio estas bona scienca tezo, sed por mi persone

multe pli gravas la religia nocio (fido), ke ĉion iniciatis nur Dio.

### Respondo laŭ islamo, el la vidpunkto de Wael H. AL-MAHDI:

Dio kreis la universon en la 'komenco', aŭ antaŭ la konceptoj de 'komenco' kaj 'fino'. Li kreis ĝin el nenio, simple per diri la vorton 'Kun!' = Estu! Alaho signifas La Dio, li estas Dio en la juda-kristana tradicio. La akto de kreado supozeble daŭris 6 tagojn.

**Respondo laŭ la Tria Testamento, el la vidpunkto de HOKAN LUNDBERG:**

Ĝi ne kreiĝis. Laŭ la Tria Testamento, io ne povas kreiĝi el nenio. Tio signifas ke la universo neniam kreiĝis, sed ĉiam ekzistas. Samlogike io ne povas fariĝi nenio, el tio sekvas ke la universo ĉiam ekzistos. Konklude la universo ne havas komencon, nek finon, ĝi do estas eterna. "Sed, kio pri la praeksploda (Big Bang) teorio?", vi verŝajne nun pensas. Bona demando! Tiu teorio ne estas rekte traktata de Martinus (la verkinto de la Tria Testamento), sed ĉar liaj analizoj montras ke ĉio viva ekzistas en io pli granda viva, devas esti tiel, laŭ tiu logiko, ke, kiam la praeksplodo okazis, "naskiĝis" la "subuniverso" kiun ni (niaj sciencistoj) povas pritrakti. Sed ekster "nia universo" ekzistas pli granda universo kiu siavice ekzistas en io ankoraŭ pli granda ktp. La universo kiel ĈIO kio ekzistas, kiel "mondotuto", estas do kaj eterna kaj senfina. Ĉu sonas strange? Verŝajne jes, sed provu pensi pri kiel estus se la universo ne estus senfina, kio do ekzistus "ekster" ĝi?

**Respondo laŭ spiritismo, el la vidpunkto de BERTRAND HUGON:**

La universo ne kreis sin mem. Dio kreis ĝin. Kiel? Uzante ian esprimon, mi diras: per Sia volo. Nenio havigas pli bonan ideon pri tiu ĉiopova volo, ol jenaj belaj vortoj de Genezo: "Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo."

**Respondo laŭ budaismo, el la vidpunkto de OLEG IZJUMENKO:**

Ni ne scias. Ĉar budaismo estas praktika instruo, rezonadoj pri kiu kaj kiel kreis la universon ne multe helpas al suferantaj homoj. Pli gravas tio, kio okazas nun kaj ĉi tie. Ĉiu homo povas havi proprajn ideojn pri tio kiel kreiĝis la universo, sed ili ne serĉu respondon en budaismo.

**Respondo laŭ bahaismo, el la vidpunkto de DIANO LUKES:**

La universo daŭre kaj senhalte estas kreata. La kaŭzo aŭ rezono de la procezo de la kreado estas revelaciita de Baha'u'llah. Li klarigis ke Dio deziris konigi sin al la homoj; tial li ekestigis la kreaĵaron kaj formis la universon. La universo daŭre ŝanĝiĝas laŭ la naturleĝoj fonditaj de Dio, la ĉiama kreanto. Tiu ĉi procezo de kreado la sciencistoj nomas 'evolado'.

**Respondo laŭ Oomoto, el la vidpunkto de YAS KAWAMURA:**

Estis unu punkto (ekzistas speciala nomo pri ĝi), kaj la kreinto vokis la vokalojn a o u e i, kaj poste 75 silabojn la kreinto aldonis kaj la universo estis farita.

**Respondo laŭ ateismo, el la vidpunkto de RICK MILLER:**

Laŭ mia opinio, la respondo estas simple ke ni ne povas scii certe, ĉar ni ne povas esplori la neobservitajn eventojn de la pasinteco. Eble tiu ĉi demando ne estas valida. Ni scias ke tempo, spaco, materio, kaj energio interdependas, ke neniu ekzistas sen la aliaj. Oni ne povas demandi, "Kio okazis kiam tempo ne ekzistis?" ĉar la demando estus malracia. Tamen, kiel ajn la universo ekeksistis, ni kredas ke ĝi sekvas kompreneblajn metodojn.

**Respondo laŭ la natursciencoj, el la vidpunkto de AMRI WANDEL:**

La scienca bildo diras ke la universo ekestis antaŭ ĉirkaŭ 14 miliardoj da jaroj, per granda eksplodo (la pra-eksplodo, aŭ PEKO; angle Big Bang). Laŭ tiu modelo, en la komenco la universo estis en tre varma kaj densa stato, kaj de tiam ĝi daŭre ekspansiis, malvarmiĝis kaj maldensiĝis. Komence la spaco estis plena de homogena varmega materio kaj radiado. Kiam la aĝo de la universo estis ĉirkaŭ unu miliardo da jaroj aperis la unuaj galaksioj kaj steloj. Tiu bildo baziĝas je pluraj observoj, la ĉefaj estas la malproksimiĝo de la galaksioj kaj la kosma mikro-onda fona radiado. Se oni



mezuras la rapidecon kaj la distancon de la galaksioj, eblas kalkuli antaŭ kiom da tempo ĉiuj galaksioj estis tre proksimaj unu al la alia, kiam la ekspansio komenciĝis. La rezulto estas la aĝo de la universo. Uzante la konatajn leĝojn de fiziko kune kun tiuj observoj eblas akurate priskribi la historion de la universo ekde la unua sekundero, sed ne pli frue: ni ne povas respondi la demandon kio estis antaŭ la pra-eksplodo aŭ kial ĝi okazis. Tiuj demandoj apartenas al la reĝimoj de filozofio kaj teologio. Tamen la scienca bildo kaj la religia ne kontraŭas unu la alian, ĉar la religia bildo estas simbola, interna

koncepto kaj ĝi ne devas esti taksata per sciencaj mezuroj.



## Solberga, loko en Bohuslando

### Solberga, en ort i Bohuslän

de Ingegerd Granat



*Stegelberget (la ŝirrada monto).*

#### La mono de Sinjoro Arne

Nia granda verkistino, Selma Lagerlöf, dramigis veran eventon, kiam ŝi verkis la libron "Herr Arnes penningar". La reala okazaĵo estas rakontita en libro nomita "La ŝvebanta episkopo" fare de Carl-Henric Martling. Jen la rakonto, kiu okazis en Solberga de Bohuslando.

#### Herr Arnes Penningar

Vår stora författarinna, Selma Lagerlöf, dramatiserade en verklig händelse när hon skrev boken "Herr Arnes penningar". Den verkliga händelsen återberättas i en bok som heter "Den svävande biskopen" av Carl-Henric Martling. Så här kommer berättelsen som utspelar sig i det Bohusländska Solberga.



En la printempa vintro de 1586, tri submajstroj de tanistoj vagis direkte al Solberga. Ili ricevis loĝejon en la bieno de Branhög, kvankam ili aspektis suspektindaj kaj parolis malbonan svedan. Poste montriĝos, ke ili estas skotoj. Ili tenis distancon al aliaj, kaj akrigis siajn longajn tanistajn tranĉilojn.

